



## ENHAVO

Enhavo.....	1
Kalendaro.....	1
Okazis.....	2
Zamfesto 2006.....	2
Tuluzanoj en Katalunio.....	3
Prelego pri Brazilo.....	3
Espéranto : au collège ça marche !!!!.....	4
Compte rendu de la soirée internationale des étudiants étrangers.....	4
<i>Monato</i> disponible à la médiathèque de Toulouse!.....	5
Okazos (Ne ratez pas.....)	6
Esperantistoj kaj okcitanoj kune en Béziers.....	6
Printempaj kaj someraj renkontiĝoj.....	6
Les Congrès d'associations en France	6
Rencontres à l'étranger.....	7
Spécial familles avec (ou sans) ..... jeunes enfants.....	8
Por lerni : Esperanto-kursaroj.....	9

## KALENDARO

### MARTO

- 2 Manĝo Klaĉo  
Maison de Quartier Rangueil
- 17 Porokcitana manifestacio en  
Béziers
- 17-18 Week-end **d'initiation** et de  
pratique de la langue internationale  
espéranto (cours de **conversation**)  
Arrout (Ariège)
- 29 Debato en "Bâton à Palabre"  
temo : spertoj de ĵus-vojaĝintoj en  
Hindio

### APRILIO

- 20 Manĝo Klaĉo – Labarthe s/Lèze ĉe  
B.Martinez (05.61.08.51.96)
- dato ne certa Debato en "Bâton à Palabre"

### MAJO

- 4 Manĝo Klaĉo  
Maison de Quartier Rangueil
- 9 Journée de l'Europe (Stands)
- 26-27 Forum des Langues (Place du  
Capitole)

Esperanto-Kultur-Centro

1 place des Avions, 31400 Toulouse

tel/fax 05 61 25 55 77

esperanto.toulouse@free.fr <http://esperanto.toulouse.free.fr/>

## OKAZIS

### Zamfesto 2006

La Zam'festo 2006 de la tuluzaĵaj asocioj por esperanto disvolviĝis denove en agrabla etoso. Denove la rusaj gekuiristoj preparis bonan manĝon, kiu daŭris pli longe ol antaŭvidite. Post abunda deserto kaj kafo, estis iom da tempo por babili, saluti amikojn, kelkfoje delonge ne viditajn, kaj ĉefe rigardi la du librobudojn, rapide foliumi librojn aŭ broŝurojn, aĉeti kelkajn. Tempo estis ankaŭ por viziti la grandegan vinilkosmo-tablon, denove rigardi, aĉeteti...

Post tio komenciĝis prezentado de skeĉoj, diritaj de Kiki kaj Rikardo. Aparte agrabla momento, laŭ mi, agrabla por ĉiuj, kaj speciale utila por komencantoj aŭ komencintoj, ĉar montras al ili, ke post malmulte daŭra periodo da lernado jam grandajn pecojn oni jam povas kompreni.

Finfine venis la koncerto ludita de Primaël kaj liaj kunmuzikantoj, kun kantoj kantitaj de Flavie. Ili ludis kune per unua fojo, kaj vere estis sukceso.

La spektaklaro estis, ŝajne, malpli densa ol la pasintajn fojojn. Ĉu ĉar oni (la organizintoj) volis ke tiel estu, aŭ ĉu ĉar oni ne trovis alian spektaklon? Ŝajnas ke multaj ŝatis havi tempon por trankvile finmanĝi (estas festomanĝo, ĉu ne?), babili dum sufiĉe longa eksterprograma tempo. Eble tiufoje ni trovis la ĝustan densecon?

Daniel



## Tuluzanoj en Katalunio

La 8, 9 kaj 10an de decembro okazis la tridektria esperanto kongreso de Katalunio en Amposta.

Por mi estis mia unua kongreso kaj mi timis pri mia prononco ĉar ĝis tiu momento mi nur parolis kun Francoj.

Do ni foriris, Flo, Sylvie kaj mi ĝis Amposta en Hispanio.

Dum la vojaĝo ni parolis en esperanto kaj mi tre ĝojis konatiĝi kun Flo. Li parolis pri la muzika movado en esperanto kaj Sylvie klarigis al mi siajn vojaĝojn tra la mondo.

Kiam ni alvenis, mia koro batis tre rapide ĉar mi konis neniun sed ekde la komenco homoj parolis kun mi kaj ili volis scii de kie mi venas ĉar mi ne tre similas al Francoj.

La etoso estis tre bona kaj mi partoprenis multajn prelegojn kiuj temis pri Nepalo, Zamenhof kaj la jida, ĉigongo, malkresko de la glaĉeroj en Eŭropo...

Mi helpis Flon por lia budo de muziko.

Kiki (Christine) kaj JoMo alvenis post ni. Nekredeble !!

Mi ekkonis Tuluzanojn en Hispanio. Nur per Esperanto tio povas okazi!!

Finfine mi partoprenis la koncertojn de Kaj Tiel Plu kaj JoMo.

Estis vere amuze aŭskulti esperantan muzikon. Estis multaj gejunuloj de Belgio, Rusio kaj Germanio.

Dimanĉon, ni vizitis Ampostan kaj ĝiajn belajn birdojn. La vetero estis tre agrabla.

Pri la kongreso, mi memoros la simpation de homoj, kaj ke mi malkovris la bonan junulan etoson.

Samia HARIR

## Prelego pri Brazilo

Brazilo estas lando ĉiam interesa. Ĝi estas granda kiel kontinento, ĝia kulturo estas miksaĵo de Amerikaj, Afrikaj kaj Eŭropaj kulturoj, kaj ĝia muziko ĉiam estas sukcesa eksterlande. Plie, Brazilo estas lando kiu ĉiam rigardas estontecon. Brazilo havas ĉion por vekti ĉies intereson.

Pri tiu bela lando, Luko (Lucas Vignoli Reis) parolis al la anoj de EKC en sidejo de CIDES vendrede la duan de februaro. Luko estas junulo, studas fizikon en sia lando kaj nun vojaĝas tra Eŭropo ĉar li gajnis premion de la Brazila Esperanto-Ligo. Por tiu konkurso li skribis longan eseon pri religiaj baroj kaj ankaŭ prelegis pri tiu temo antaŭ ĵurio. La celo de tiu vojaĝo estas diskonigi Brazilon al eŭropanoj kaj ankaŭ kunigi eŭropan kaj brazilan movadojn.

La prelego estis neformala kaj amuza, fakte, pli ol prelego, ĝi estis konversacio inter Luko kaj la spektantaro. Luko parolis al ni pri historio, ekonomio kaj iomete pri politiko. Unu el la demandoj estis pri faveloj, tiuj malriĉaj kvartaloj kiuj estas ekster la atingo de la ŝtato. Sed la plej sukcesa temo estis muziko kaj danco. Luko parolis al ni pri la historio kaj evoluo de brazila muziko kaj eĉ aŭskultigis nin belajn kanzonojn kiel "La Knabino de Ipanema". Iu demandis al la preleganto kiel fartas nun tiu knabino, tamen, neniuj scias kiu estas tiu knabino. Domaĝe! Ankaŭ pri sambo li parolis kaj li eĉ dancis por montri kiel oni dancas tiajn dancojn. Fakte, ni lernis ke tiaj dancoj ne havas paŝojn, kiel multe da eŭropanoj kredas, sed nur fleksebla maniero ĵeti la gambojn. Tiel, eŭropanoj klopodantaj trovi la paŝojn ĉiam amuzas brazilanojn.

Post la prelego, ni ĉiuj vespermanĝis en vegetara restoracio. La vespermanĝado, kiu estis partoprenata de 17 homoj, estis amuza kaj gaja, kaj ni ĉiuj aŭskultadis amuzajn mezepokajn vortludojn.

Sabate vespere, EKC-aj gejunuloj denove vespermanĝis kun Luko ĉe Katrin. Tie, en belega etoso, oni denove paroladis pri Brazilo kaj pri ĝiaj kulturo kaj lingvo, kaj eĉ povis drinki kajpirinjon, kiu estas tipa brazila alkohola drinkaĵo.

Redakcio

## Espéranto : au collège ça marche !!!!

Eh oui comme vous savez tous, depuis septembre je vais d'établissement en établissement pour proposer l'exposition *L'espéranto à quoi ça sert ?*

Et en faisant le point, ça marche bien, si si je vous assure

- 9 expositions
- 4 interventions dans les classes
- et surtout 4 clubs d'espéranto ouverts dans les établissements suivants :

Collège Marengo : lundi de 12h30 à 13h30

Collège Jacques Prévert : jeudi de 13h à 14h

Collège Emilie de Rodat : Jeudi de 10h20 à 11h25

Collège Croix Daurade : Vendredi de 13h à 14h

Le club s'adresse à tous les élèves intéressés de la sixième à la troisième, en général après la pause repas.

Dans un collège, la Principale n'avait encore jamais entendu parler de l'espéranto. C'est quelqu'un de très ouvert qui a écouté avec attention ma proposition de club. Ce qui m'a permis de commencer rapidement avec 12 élèves.

Au lycée Bellevue, j'étais invitée dans trois classes différentes ou j'ai pu parler pendant une heure de la langue internationale et du mouvement au niveau mondial.

Une vingtaine d'élèves est intéressé pour apprendre la langue.

Au collège Emilie de Rodat je suis intervenue pendant deux heures lors d'un cours optionnel suivi par une classe européenne.

Je commence un club le 1er mars avec 7 élèves de 5ème et un professeur intéressé par la langue.

Mes élèves sont très motivés et nous avons commencé la correspondance avec des Brésiliens, Hongrois, Polonais et Chinois.

Le but de la correspondance est de les faire progresser en Espéranto et aussi d'échanger des idées, photos, cultures et traditions des différents pays.

Au bout de quelques séances, je demande au collège d'acheter des manuels pédagogiques, dictionnaires, disque et dvd de Gerda pour les élèves.

Les collégiens sont très demandeurs d'activités et curieux d'apprendre de nouvelles choses.

L'ouverture de ces clubs permet à l'association de se faire connaître au niveau de l'éducation et des jeunes.

En espérant que cette première initiation permettra aux enfants de s'ouvrir au monde et à l'échange culturel, nous voulons étendre notre campagne d'information dans les centres de loisirs et les écoles primaires.

Samia Harir

## Compte rendu de la soirée internationale des étudiants étrangers

**Vendredi 17 Novembre 2006  
20H00 à l'hôtel de Région**

Cette soirée a pour but d'accueillir les nouveaux étudiants étrangers et de les informer sur tout ce qui existe sur Toulouse au niveau culturel.

**Réunion de préparation Mardi 14 novembre 2006**

-Programme de la soirée avec disposition des stands

Le stand d'EKC est bien placé. Nous avons une table, une grille et deux chaises.

-Liste des bénévoles pour l'organisation de la soirée, contrôle des invitations, service du vin et gestion des vestiaires.

Pour cette soirée, il me fallait motiver quelques membres d'EKC en particulier des jeunes. J'ai envoyé un mail à tous les jeunes. Et j'en ai parlé plus particulièrement à Pere et Séverin qui m'ont tout de suite répondu positivement. Sylvie et Jean seront aussi présents pour tenir le stand. Donc en tout nous serons 5 à représenter l'association; c'est la deuxième année que nous

participons à cette soirée mais c'est la première fois que nous aidons à l'organisation.

**Vendredi 17 novembre 2006 19h30**

Installation du stand avec Jean et Sylvie. Nous avons exposé des dictionnaires, BD et brochures.

Quelques tracts qui informaient sur les cours et des calendriers 2007 devaient être distribués aux étudiants. Après l'arrivée de Séverin et Pere j'ai pu aller servir le vin aux invités.

L'ambiance était très chaleureuse et beaucoup d'étudiants sont venus poser des questions à notre stand. C'était des questions générales sur la création de la langue et le nombre de personnes qui la parlent, et aussi, certains voulaient les coordonnées pour pouvoir prendre des cours.

Nous avons pu les renseigner et leur proposer les cours express de Jeannette et de Christophe.

Après avoir pris beaucoup de numéros de téléphone d'étudiants intéressés, nous avons pu déguster le buffet et regarder les différentes danses et musiques proposées.

Samia

**Monato disponible à la médiathèque de Toulouse!**

Robert Pontnau nous a fait savoir que désormais on pourra lire la revue mensuelle en espéranto, *Monato*, à la médiathèque de Toulouse.

La personne responsable de cette bonne nouvelle nous est inconnue mais nous la remercions infiniment!

Rédaction

**OKAZOS (NE RATEZ PAS...)**

**Esperantistoj kaj okcitanoj kune en Béziers**

Je la 17 de marto okazos granda manifestacio por la okcitana lingvo en Béziers. Ĝin partoprenos homoj el la tuta Okcitanio. Ankaŭ kelkaj esperantistoj el la suda Francio kaj Katalunio, instigataj de Sylvie Roques, partoprenos la manifestacion. Esperantistoj bone konas lingvajn problemojn kaj do, ili tie volas subteni plurlingvecon kaj ankaŭ diskonigi esperanton, ties filozofion kaj ties utilon por lingva ekologio. Ankaŭ JEFO subtenas tiun manifestacion.

Retlisto estis kreita ĉe Yahoo! Groups por prepari la esperantan partoprenon en tiu ĉi manifestacio. Oni povas aliĝi ĝin ĉe tiu adreso:

<http://fr.groups.yahoo.com/group/EsperantOC>

Redakcio



*Pasintjara manifestacio por la lingvo okcitana en Karkasono*

**Printempaj kaj someraj renkontiĝoj**

Nun estas la tempo plani siajn printempan aŭ someran ferion. Jen listoj de espereble interesaj renkontiĝoj aŭ kongresoj, kiujn mi elektis ĉefe en Eŭropo<sup>1</sup>. Vi elektu laŭ viaj preferoj, laŭ la temoj aŭ laŭ via monujo...

Kaj se vi preferas intensajn kursojn aŭ kursarojn, vidu la duan liston.

Bonan vojaĝon en esperantio!

Jeannette

1) ekzistas multaj aliaj; vidu <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

---

## Les congrès d'associations en France

---

### 7 au 10 avril à Artigues, près de Bordeaux:

Congrès de Sat-Amikaro

Inf: rete: [satamikarakongreso2007@orange.fr](mailto:satamikarakongreso2007@orange.fr) ,

tel.: +33-557.692.696

### 12 au 19 mai à Paris:

59e congrès de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio).

Informations et inscriptions sur [www.ifef.net](http://www.ifef.net)

### 25 au 29 mai à Bourg-en-Bresse:

Congrès interassociatif de l'espéranto en France.

Informations et programme: <http://esperanto-france.org>

### 21 - 28. julio

80-a SAT-Kongreso en Parizo.

Inf.: Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris

tel.: +33.(0)1 47 97 87 05

fakso: +33.(0)1 47 97 71 90

### 20 - 27. aŭgusto

FESTO 2007 Junula Internacia Renkonto en Montoire-sur-le-Loir, Francio,

Temo : "Muzik-E".

Inf.: [louise@esperanto-jeunes.org](mailto:louise@esperanto-jeunes.org)

---

## Rencontres à l'étranger

---

### Mars 2007

9 au 11 mars à Madrid :

Kampardoma Renkontiĝo.

Rencontre de jeunes. Pour s'y rendre depuis la région toulousaines veuillez contacter [sylvieroques@yahoo.fr](mailto:sylvieroques@yahoo.fr)

### Avril 2007

### 5 au 10 avril à Lignano Sabbiadoro (Vénétie) :

31-a IJF (Internacia Junulara Festivalo) ,

Rencontre de jeunes organisée par les jeunes italiens sur le thème « 120 jaroj de Esperanto : 120 jaroj da interkompreniĝo kaj paco ».

Prezo: 140 € ĝis 190 € laŭ aĝo

Renseignements : <http://iej.esperanto.it/ijf/2007>

### Mai 2007

#### 29. avril - 9. mai

19-a Esperanto-festivalo "Aroma Jalto", Ukrainio.

Inf.: p/k35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio.

tel.h.+380-044-2851701, tel. m.+380-80674403172;

rete: [volodimir\\_h@yahoo.com](mailto:volodimir_h@yahoo.com)

#### 4 – 5 - 6 mai

4a printempa renkontiĝo - Vallgorguina (Katalunio)

Kursoj, prelegoj, atelieroj kaj ekskursoj, en gastejo ĉirkaŭita de kverka arbaro meze de natura parko.

[http://www.esperanto.cat/printempo2007/index\\_eo.php](http://www.esperanto.cat/printempo2007/index_eo.php)

### Juin 2007

#### 12 – 20 juin 29-a

Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, 12 km de la urbo Koszalin.

Inf.: Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkesto 30, PL-75-016 Koszalin-1, Pollando. ĈEP-organizanto <[barslavo@wp.pl](mailto:barslavo@wp.pl)>, tel.: +48-503-417-825

#### 22 juin - 1er juillet

Internacia Arta Esperanto-Festivalo Velura sezono, Jalta, Rusio

<http://www.jaltaespero.narod.ru/esper/festivalo.html>

### juillet 2007

#### 14 - 22. julio

43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-43) en nordlitovia urbo Siauliai. Inf.: Litova Esperanto-Asocio, p.k.167 , LT-44287 Kaunas, Litovio.

Rete: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt) tel.:+370-37-208503,

poŝtel.: +370-687-12219, fakso: +370-37-228616

**14 - 20. julio**

[Internacia Esperanto-Konferenco](#) en Pazarĝik, Bulgario. Ĉeftemo: mitoj kaj legendoj. Inf: Eric Lauber, 1 rue Louis-Antoine de Bourgainville, FR-78180 Montigny-Bx. Francio, tel.: +1 30 96 67 91, rete: [kasisto@osiek.org](mailto:kasisto@osiek.org)

**19 - 25. julio**

[Internacia Junulara Semajno, IJS](#) en Hungario. Inf: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87. HU-1675 Budapeŝt, Hungario. [ijs@ijs.hu](mailto:ijs@ijs.hu)

**21 - 28. julio**

18-a Ekumena Esperanto-Kongreso 2007, 60-a kongreso de IKUE, kaj 57-a kongreso de KELI en Pelplin, Pollando.

Inf: Kozyra Eduard, PL-83-130 Pelplin, Strzelnica 8 [esperanto@powiat.malbork.pl](mailto:esperanto@powiat.malbork.pl)

**25 julio - 5. aŭgusto**

16-a MELA (MEMzorga LAg-umado) en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbani. Inf: (poŝtelefonoj) Laca +36-30-2097864, Andi: +36-30-2752068. Inf: DL8oap(ĉe)gmx.net

**27. julio - 1.aŭgusto**

[Festivalo Arta Lumo](#), Kuopio, Finnlando. Multflanka kultura aranĝo kun bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj en ĉarma ĉelaga urbo. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinko, Finnlando, [ArtaLumo@esperanto.fi](mailto:ArtaLumo@esperanto.fi)

**28 julio - 3 aŭgusto**

[63-a Internacia Junulara Kongreso](#) en Hanoi, Vjetnamo

**28 julio - 4 aŭgusto**

[7-a Kongreso de Europa Esperanto-Unio, EEU](#), en Maribor, Slovenio. Inf: [eeu.kongreso@mail.com](mailto:eeu.kongreso@mail.com)

**28 julio - 4 aŭgusto**

EIK, Eŭropa Infana Kongreseto dum EEU-Kongreso apud Maribor, Slovenio. Inf: Esperanto-Societo Maribor, Maistrova ulica 5, SI-2000 Maribor, Slovenio. Rete: [eeu.kongreso@gmail.com](mailto:eeu.kongreso@gmail.com)

**Aŭgusto 2007**

**4 - 11. aŭgusto**

[92-a UK, Universala Kongreso de Esperanto](#) en Yokohama, Japanio. Inf: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +3110-4361044, fakso: +3110-4361751. Rete: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

**4 - 11. aŭgusto**

[38-a Internacia Infana Kongreseto, IIK 2007](#) en Esperanto-Domo Jacugatake, Japanio. Inf: Bert Schumann, 9 rue Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio, tel: +33-299836986, rete: [bert.schumann@free.fr](mailto:bert.schumann@free.fr)

**18 -25. aŭgusto**

[RET-07 \(Rusiaj Esperanto-Tagoj\)](#) kun la temo "Vi ne solas!" ĉe la Azova maro apud la urbeto Primorsko-Ahtarsk, en la bazejo "Lotuso" Inf.: Organiza Komitato [ret-07@mail.ru](mailto:ret-07@mail.ru)

**Septembre 2007**

**12 - 16. septembro**

16-a konferenco de IKEK (Internacia Komunista Esperanto-Kolektivo) en Dobřichovice apud Prago. Inf.: [dieter.rooke@tiscali.ch](mailto:dieter.rooke@tiscali.ch)

**21 - 23. septembro**

[XXIII ARtaj KONfrontoj en ESperanto "ARKONES"](#) estas la granda manifestacio de Esperanto-kulturo en Poznań, Pollando. Pararele kun ĝi okazas studsesio de interlingvistiko en Esperanto ĉe Universitato de Adam Mickiewicz. Inf.: [arkones@esenco.org](mailto:arkones@esenco.org) tel.: +48-509-400-317

---

**Spécial familles avec (ou sans)  
jeunes enfants**

---

**7 au 14 avril au château de Grésillon**

**2-a FRINGOJ** (Festa Renkonto Internacia de GeknabOJ), rencontre internationale d'enfants et de jeunes (de 7 à 18 ans). Activités et ateliers pour ceux qui parlent ou qui apprennent l'espéranto. La rencontre se terminera par une exposition et une fête qui aura été préparée par les participants pendant la semaine. [Hejmpaĝo de familio Schumann](#)

contact : Elisabeth Barbay tel : +33 (0)1 48 47 23 87 eliz.barbay(à)wanadoo.fr  
25, allée Gabriel Fauré  
93140 Bondy

**2 - 9. aprilo**

**23-a Printempa Semajno Internacia (PSI)** en Bonn, Germanio. : [psi@esperanto.de](mailto:psi@esperanto.de) Prezo : 290 € ĝis 340 € (laŭ komforto) Rabato por junuloj kaj infanoj

**16 – 20 mai**

**Berlina Arbara Renkontiĝo, BARO** en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. Inf.: Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. Inf: DL8oap(ĉe)gmx.net

**22 julio - 4 aŭgusto**

**29-a Renkontiĝo de Esperantaj Familioj (REF)** en Nagyvisnyó (inter la urboj Eger kaj Miskolc) en Hungario. Inf: Vas-Szegedi Julianna, Kismuhi u. 5. III/12, HU-5350 Tiszafüred, Hungario. Tel: +36-70-4501688, rete : [j1969@vipmail.hu](mailto:j1969@vipmail.hu)

**6 - 9. septembro**

**Berlina Arbara Renkontiĝo, BARO** en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. Inf.: Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. Inf: DL8oap(ĉe)gmx.net

.... et beaucoup d'autres, que vous  
trouverez sur :

<http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

**Por lerni : Esperanto-kursaroj**

**17 et 18 mars à Arrout (Ariège):**

Week-end d'initiation et pratique de la langue internationale espéranto.

Du samedi à 10 heures au dimanche à 19 heures.

**Objectifs** : Découverte de la langue espéranto et de sa culture. Toute la grammaire, les phrases de la vie courante, et le tour des possibilités actuelles d'utilisation. Pour le niveau conversation : s'exercer à parler à l'aide de jeux, jeux de rôle, etc...

**Déroulement** : 10 h de cours, à répartir sur les deux jours. Soirée avec jeux et films en espéranto. Hébergement dans chambres de 3 ou 6 lits.

**Lieu** : Gîte La Maraude. 09800 Arrout

**Info-Inscription** : [Centre Culturel espéranto](#) 05 61 25 55 77- [esperanto.toulouse\(à\)free.fr](mailto:esperanto.toulouse(à)free.fr)

**25 au 31 mars à Peisey-Nancroix (73) :**

Stage pour débutants et ceux qui ont déjà commencé.

Le stage a lieu dans un chalet-gîte, dans un cadre exceptionnel, avec des possibilité de ski, raquettes et promenades à pied.

**Prix** : 30€ /jour en pension complète draps compris. On peut s'inscrire à la journée.

**Info** : Thérèse DEPECKER

04.79.07.53.10 ou 04.79.07.59.96

Echines dessus, 73700 Bourg-Saint-Maurice

Rose EMPEREUR 04.79.04.11.79  
ou 06.18.81.17.44

**10 - 14 & 17 – 21 aprilo**

Pedagogia kaj literatura staĝoj, preparantaj al la 3a-grada ekzameno.

**10 - 14 & 16 – 20 julio,**

Kursoj por la 3a kaj la 4a-gradaj ekzamenoj.



Kvinpetalo, Rue du Lavoir, F-86410  
BOURESSE Tel. ~33 (0)5 49 42 80 74  
[informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)  
<http://www.kvinpetalo.org>

**16 au 23 mai à Agde :**

Stage au bord de la Méditerranée, avec des cours pour 3 niveaux. Le 2e niveau sera un cours de conversation animé par Judith Horvart (Hongrie). Également au programme : des excursions et des soirées.

**Contact :** Christian Herbette-Rizo  
22, ZA Le Bousquet, 34310 Montay  
T +33(0)4 67 21 86 61 [chrizo@worldonline.fr](mailto:chrizo@worldonline.fr)

**7 julio – 18 Aŭgusto**

Unusemajnaj Staĝoj en kastelo [Gresijono](#) ;  
kursoj 1-a , 2-a kaj 3-a gradoj: . Inf:  
Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezijono,  
FR-49150 Bauge, Francio. Tel./respondilo:  
(+33) 241 89 10 34, rete:  
[kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

**11 – 17 aŭgusto**

11èmes Rencontres Internationales de Plouezec  
(Côtes d'Armor, bord de mer)

Cours tous niveaux, et pour enseignants, 3  
h/jour, + nombreuses animations.

Contact: Roger EON 5 Hent Toul Broc'h, FR  
22470 Plouezec; T 0698495982  
[pluezk@gmail.com](mailto:pluezk@gmail.com) <http://www.babelo.org>

**18 - 24 aŭgusto**

[Somera Festivalo](#) - kunludu kaj kunstudu en  
Barlastono, Britio. 3-nivela staĝo ebleco  
turismi. Inf: Esperanto-Domo, Station Road,  
Barlaston, Staffordshire, ST12 9DE, Britio Tel:  
+44-(0)1782-372141 - [eab@esperanto-gb-org](mailto:eab@esperanto-gb-org)

**18-25 aŭgusto**

[33-a Internacia Semajno de Esperanto](#) en Sète  
apud Montpellier suda Francio. Plurnivelaj  
kursoj, 100m de mediteranea plaĝo. Inf.:

Esperanto, Kulturo kaj Progreso 10, impasse  
Ecole J.Ferry, FR-34290 Servian, Francio.  
Tel/fakso: +33 (0)4 67 39 16 30., rete:  
[jf.passarella@free.fr](mailto:jf.passarella@free.fr)

---

## KUNLABORU KUN LA KROKODIL'!

---

Ĉu vi ĉeestis en iu aranĝo rilata al Esperanto?  
Ĉu vi konas iun interesan retejon por  
esperantistoj? Ĉu vi estas skribema?

Sendu viajn kontribuaĵojn al nia bulteno, tiel ĝi  
pliboniĝos! Kaj ne forgesu sendi viajn fotojn!

La venonta Krokodil' aperos je la unua semajno  
de majo. Sendu viajn kontribuaĵojn almenaŭ unu  
semajno antaŭe.

La retadreso de la redaktoro estas

[pere@quintanasegui.com](mailto:pere@quintanasegui.com)

Pere Quintana Seguí